



# Nia kanto



memuaro  
de  
mia juneco

verdavojeto

## Nia kanto

---

Homoj bele vestitaj sidis en la teatrejo.

Mi neniam vidis tiel belvestantan spektantaron. Kaj mi en pulovero kaj jupo de lanaĵo, estis sidanta apud Jodzefo en orkestra truo. En tia vestaĵo mi ne rajtis sidi inter tiaj homoj. Mi eĉ ne havis monon por aĉeti unu bileton por sidi tie.

Sed mi estis feliĉa. Mi estis speciala. La direktisto donis min permeson sidi apud Jodzefo.

La koregato de Jodzefo ignoris mian ekziston, sed mi estas certa, ke ili estis morte kuriozaj. Kaj mi ankaŭ afektis ignoron.

La programo estis opereto “Die Csardasfurstin / La Ĉardaŝreĝino”. Vigra gaja muziko plenigis tutan teatrejon. Nature mi povis vidi preskaŭ nenion, kio okazis sur la scenejo. Tamen mi aŭdis kanton, muzikon, dancadon.

Dum lia paŭzo Jodzefo demandis min,

“Ĉu vi forlasis aeron?”

Kia demando! Kia demando por ĵeti al mez-dudeka junulino!

Sed mi ne estis kolera al li, nur diris “Ne”.

Li diris “eble mia najbaro” kaj ankoraŭ movigis siajn naztruojn iom longe, kaj reiris al sia muziko.

♪ ♪ “Das ist das leben, das ist das leben..” ♪

“Tio estas la vivo, tio estas la vivo..”

Ni kantis survoje al hejmo, kie liaj du kuzoj kaj li loĝis. Fakte li estis ilia gasto kiu dormis sur la sofo.

Kaj tiel ĉi opereto fariĝis nia kanto.

## Li estis silueto, kiam unuafoje mi renkontis lin.

---

La vagonaro atingis al la stacidomo de kolonjo.

Ĉiuj pasaĝeroj kiuj marŝas kune kun mi al elirejon estis altaj vestite nigre, kaj mi sentis, ke mi marŝis en nigra arbaro.

Je la fino de platformo oni vidis lumon tra granda fenestro, kaj ĉio alia estis en ombro.

Kaj mi vidis la silueton kiu staras en la mezo de la pasanta pasaĝeraro kontrŭ li. Mi ne povis vidi lian vizaĝon, sed mi sciis, ke li estis li.

Alproksimiĝinte, mi povis vidi malprecize lian trajton. En lia mano unu ruĝa rozfloro brilis.

Li kisis min kaj donis la ruĝan rozon al mi kaj diris “mia patrino ne permesas bonvenigi vin sen rozo”.

Suna aŭtuna posttagmeze ni marŝis tra la strato de Kolonjo flanke de unu al alia.

Li portadis mian pezan kofron, kaj havis malfacilaĝon marŝi rekte. Estis ne tre longe de lia resaniĝo. Li suferis ikteron, kaj ne havis normalan forton, tamen li insistis.

Ni preterpasis grandan katedralon, kaj li diris,

“Ni kune supreniros al la turo iam, bonbone?”

Ni remarkis, ke malgranda parto de la katedralo estis dameĝita, kaj ni decidis, ke la parto estos reparita kiam ni supreniros sur la turo.

Mi ne memoras per kia trafikilo ni vojaĝis al Opladen, la urbeto kie Jodzefo vivis tiutempe.

Unue ni iris al la apartamento, kie li havis spacon.

Post vespermanĝo li kondukis min al ne tre bela trinkejo. Li iris al viro, kiu kun malbonhumoa vizaĝo viŝanta teleron ĉe vendtablo. Jodzefo parolis al li ion, kaj tuj turnigis al mi kaj mansignis “venu!”

Je la malhela angulo ekzistis ŝtuparo.

La trinkejo ankaŭ estis hotelaĉo, kies ĉambro havis preskaŭ nenion. Lito, seĝo kaj tablo estis ĉio kion mi povis uzi.

Jodzefo malfermis iometete fenestron por konduki aeron dum nokte.

“Ŝlosu post mi, mi venos morgaŭ matene” li diris kaj min lasis tute sola.

La ĉambro estis nuda, ne tre komforta, kaj rememorigis min la kazernon en Ĉekoslovakio, kie mi kun kelkaj samideanoj tranoktis dumvoje al Budapeŝto de Moskvo.

Soldatoj ne estis tie. Kialon mi ne sciis. Iu esperantisto aranĝis ĝin kiel nia tranoktejo.

Nur la sola ruĝa rozo estis kolora en tiu ĉambro. Mi mem estis senkolora.  
Tio estis la unua tago de nia vivo kune, kion mi ne sciis tiutempe malgraŭ.

## Purpura papermono

---

Mi ne multe memoras miajn tagojn en Opladen, Germanujo.

Mi demandis al Dezsö, unu el la kuzoj, kiel estis nia dormaranĝo.

Lia tuja respondo estis jene: Ni havis nur du ĉambrojn, do mia frato kaj mi dormis en unu ĉambro kaj vi kaj Jodzefo dormis en la alia.

Mi devis tuj re-respondi al li. "kion vi diras? Unue, ni ne estis geedzoj, do ne povis dormi en sama ĉambro. Plie, estis en la ĉambro nur unu sofo, kio ne estis sufiĉe granda por du personoj. Mia malpreciza memoro diras, ke unu el vi fratoj havis noktolaboron, ĉu ne?"

Lia denova respondo estis do. "Ah, jes. Mi havis noktolaboron tiu semajne kaj mi memoras ke vi restis nur du aŭ tri tagojn ĉe ni."

Mi devis dormi en hotelo je la plej unua nokto, ĉar ili ne havis lokon por mi. Verŝajne ni korespondis kiu dato estus pli konvena por ili akcepti min, ktp., tamen leteroj koresponditaj inter ni ne ekzistas plu.

Kaj nun respondo de Dezsö klarigis min plie, kial nur tri, lia frato Laci, Jodzefo kaj mi, vizitis Japanan ĝardenon en Leverkusen.

Laci havis aŭton kaj li ŝoforis nin al la Japana ĝardeno, por ke Dezsö povu dormi sen nia ĝeno.

Kelkaj fotoj ekzistas de tiu vizito, kaj ili ankaŭ rememorigis min kiel estis la vizito.

Mi kredas ke mi restis ĉe ili pli longe ol du aŭ tri tagoj, ĉar kelkajn aferojn, kio okazis dum mia restado tie, mi memoras.

Ilia apartamento estis sur dua etaĝo, kaj ne havis kuirejon.

Oni lavis manĝilojn kaj legomojn en banĉambro, kaj por kuiri uzis fojron ekster la apartamento.

La fojro estis en kolidoro.

La etaĝo estis dividita en du apartamentoj. En alia loĝis juna Italo nomita Giuseppe. Mi ne scias ĉu li vivis sola aŭ havis kunloĝantojn.

Ĉiuokaze, li aperis el lia apartamento ĉiam ajn mi estis ĉe la fojro. Kaj li klopodis alparoli al mi. Mi nek komprenis Italian lingvon nek Germanan. Mi kredas ke li parolis al mi itale.

Verŝajne li aŭdis paroladon inter Jodzefo kaj mi, kaj prenis Esperanton por Itala. Tio certe

eblas. Jodzefo rakontis min iam, ke li parolis Esperanton en Italujo, kaj Italoj demandis lin kian dialekton li parolas.

La fakto, ke mi ne komprenis lin, ne ĝenis Giuseppe. Li tamen aperis el lia apartamento ĉiamajn mi estis ĉe la fojro kaj mi ne plu povis toleri lin. Mi diris tion al Jodzefo, do li kaptis Giuseppe sekvantafoje, kaj, laŭ li, li diris al Giuseppe "Ŝi eatas mia, eĉ ne pensu ke vi povas havi ŝin!", neniam plu Giuseppe ĝenis min.

Jodzefo estis preparanta por enmigri al Kanado tiutempe. Mi kredas ke li jam ricevis vizon por eniri en Kanado kiel enmigrinto.

Estis jam malfrua aŭtuno. Ni estis promenanta en parko de Opladen. Grandaj folioj de platano kovris padon de la parko. Ni marŝis sur la folioj kaj seka sonado de la folioj ĉagrenigis nin. Ni sidis sur benko dum promonado. Li elprenis ion el lia monujo. Ĝi estis faldita papermono de Kanado. Ĝi estis purpura, valoras \$10. Jam de longe li havis ĝin en sia monujo kiel ĉarmo, por lia sukcesa enmigro al Kanado.

Li donis ĝin al mi kaj diris ;

“Nun vi havu ĝin, por ke vi povos veni al Kanado ankaŭ. Metu ĝin en via monujo.”

Mi faris kiel li diris.

Dekoj da jaroj poste, longe post lia forpaso, kiam mi rimarkis, ke li neniam proponis nian geedziĝon, mi cerbumis kial tio povas okazi.

Doni al mi la purpuran papermonon estis anstataŭa propono, eble. Ni ne bezonis vortojn, ĉar en niaj koroj tio estis decidita fakto, tute natura ago. Kvankam la \$10 devis forflugi al Kanadon pli frue ol mi mem, ĉar Jodzefo estis “malsata enmigrinto”, kaj petis ĝin sendi al li.

## Kiel ĉio komencis

---

Mi estis juna infano, eble 12, aŭ 13 jaraĝa. Mi aŭdis konversacion inter miaj gepatroj kaj fratoj. Unu el miaj fratoj diris ion kaj respondo de mia patro estis jene; “Do, en tiu situacio oni devas uzi Esperanton”.

Neniu demndis kio estas ĝi, do, mi ankaŭ ne bezonis demandi. Ĉiuokaze, mi ne estis en la konversacio, certe mi estis okupita de io alia. Tamen la vorto Esperanto restis en mia kapo.

Preskaŭ dekjaroj poste, mia juna fratino komencis lerni Esperanton. Ŝi ankaŭ kiel juna infano legis pri Esperanto kaj volis lerni ĝin, sed neniam parolis al mi pri tio.

Kiam ŝi komencis lerni Esperanton, mia kuriozeco ekvekiĝis. Kaj mi ankaŭ komencis iri al la lernejo, kie ŝi estis lernanta.

Mi estis feliĉa, ĉar mi ne ŝatis lerni Anglan lingvon, malgraŭ oni devis lerni dum deviga edukado.

Mi estis 7-jaraĝa kiam la dua mondomilito finis. Kaj Usonaj soldatoj venis al nia lernejo por kontroli niajn lernolibrojn. Preskaŭ ĉiujn liniojn de paĝoj de la libro estis forstrekita, kaj ni infanoj sidis antaŭ tia libro.

Du soldatoj venis en nia klasĉambro kaj trapasis inter vicoj da tabloj rigardante ĉiujn librojn. Unu soldato pasis apud mi, kaj lia pistolo fiksita ĉe lia talio batis mian ŝultron. Tio estis nur hazarda, kaj li tute ne rimarkis kio okazis al mi. Mi timegis. Al mi, mia ŝultro kaj koro samtempe, drolis. Verŝajne ekde tiam mi ne estas bona lernanto de Angla lingvo.

Novaj lernantoj de lingvo kutime komencas korespondi kun alilandanoj por ekzerci uzadon de la lingvo kion si lernas. Mia korespondantoj estis maljunaj Espersntistoj, kiuj volis helpi komencantojn, kaj junaj kiuj volas ekzerci ĝin same kiel mi. Unu de la junaj korespondantoj estis Jodzefo, Hungaro vivanta en Jugoslavio.

Eble nia korespondado daŭris dum du jaroj. Tion ankaŭ mi ne estas certa.

## Je haveno de Jokohamo

---

Mi kun sep geamikoj enŝipiĝis en ŝipon nomita “Ĥabarovsko”, kio marveturis inter havenoj Jokohamo kan Naĥodko, por nia unua granda vojaĝo al Budapeŝto, Hungario, kie okazis la 51-a Universala Kongreso de Esperanto. La dato estis 19-a de julio, 1966, kaj mi ja jam estis 28 jaraĝa.

En 1965 la 50-a Uneversala Kongreso okazis en Tokio, kaj mi partoprenis ĝin. Mi ankaŭ ĝuis kiel helpanto de la Kongreso. Mia fratino Micuko neebelis, ĉar ŝi jam edziniĝis kaj havis bebeton.

Dum 50-a Kongreso mi renkontis ges-rojn De Sassi de Svislando. Ilia kuraĝigo decidigis min forlasi Japanion.

Mia patro venis al haveno Jokohamo por forvidi min .

Kiam mi anoncis mian grandan forveturon al miaj gepatroj li dirid al mi,

“ Faru kion ajn vi volas, sed ne forgesu vi estas respondeca por ĉiuj viaj agoj. Kaj se vi havus problemon kion vi mem ne povas solvi, revenu hejmen, ni helpos vin”

Dum lia parolado mi aŭskurtis ĝin samtempe tradukante kion li vere volis diri al mi.

Kio alia zorgo povas esti krom filina bonkonduco por ŝia gepatra maltrankvileco, precipe kiam ilia juna filino forvojaĝas al la mondon ne konatan?

Mia patrino ne estis tre feliĉa pro mia decido, tamen ŝi samopiniis kiel patro, kiel ĉiam.

Mia fratino Micuko ankaŭ venis por forvidi min. Ŝi jam havis du bebetojn, do certe havis malfacilaĝon vojaĝi al la haveno per trajno kun du etuloj.

La ŝipvojaĝo kun samideanoj estis ĝojebla, sed la Japana maro ne estis ĝentila.